

Detlev von Liliencron,
Vilaĝa preĝejo en somero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Lace kantas la kantor',
lace la paroĥanaro.
Sur ambono la pastor'
preĝas por malamikaro.

Poste la prediko ja
vere estas grandioza.
Ploras baronin' sur la
supra seĝo blazonoza.

Amen, beno, de l' orgen'
lasta sono. Tra l' aero
flirtas papilioj jen
en la gloro de l' somero.

*Traduko de la Germana poemo "Dorfkirche im Sommer" de DETLEV VON LILIENCRON (*1844-06-03 – †1909-07-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-08-31.*

MR-425-1 / Arg-281-573 (2005-02-06 13:07:33)